

Numero: 257.
Oktobro: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Lingva egaleco

Ĉu ekzistas lingva egaleco? Onidire jes, sed tamen en la praktiko ni ĉiutage spertas, kelkaj lingvoj ĝuas privilegion.

Antaŭ nelonge mi vizitis apudlandliman aŭstran urbeton proksime al la hungara urbo Kőszeg. Antaŭ la unua mondmilito ĉi teritorio apartenis al Hungario. Ankoraŭ nuntempe tie vivas hungaroj, kiel aŭstraj civitanoj. Vere mi ne scias ilian nombron, sed tio ne gravas.

En tiu aŭstra urbeto mi vane serĉis hungarlingvajn informojn. Ne pro la tieaj hungaraj praloĝantoj. Ĉiutage miloj da hungarlandanoj vizitas, traveturas ĝin.

Sed se ni rigardas, en Hungario kun la angla preskaŭ ĉie estas legeblaj ankaŭ germanlingvaj informoj.

Al multaj homoj ĉi tiu eĉ ne pikas la okulojn. Ili preteriras ĝin. Kial ĉagreni pro tio? - certe ili pensas.

Tamen, laŭ mi tio ne estas bona. Similan situacion mi spertis ankaŭ en aliaj najbaraj landoj kies lingvo, same kiel la hungara ne apartenas al la familio de la mondlingvoj.

Ekzemple en rumana urbo, kie vivas hungaroj apenaŭ oni renkontas hungaran tekston. En la muzeo estas diverslingvaj ĉicironoj, eĉ ofte ankaŭ en iu stranga lingvo, sed mankas hungara. Se oni volas ekkoni kaj kompreni la ekspoziciaĵojn, tiam oni devas ellerni angle, france, aŭ germane.

Ĉu ekzistas justa solvo? Kompreneble, se en tiuj ĉi landoj ankaŭ la hungaran lingvon oni uzus en pli vasta rondo aŭ nur Esperanto estus uzata, kiel dua gepatra lingvo.

Ĉu tio estas sonĝo?

Eble. Sed oni devas esperi, ke iam tiu ĉi fantasta sonĝo realiĝos kaj malaperos la lingva malegaleco.

-Redaktanto-



Kial Esperanto ne povis disvastiĝi tra la tuta mondo?

Ĉiu konsentas, la zamenhofa lingvo estas grandioza, kaj dum ĝia pli ol centjara ekzisto estas pruvita ĝia vivkapablo. Tamen ankoraŭ ĝi ne povis disvastiĝi, fariĝi la dua gepatra lingvo de la homaro.

Se ĝi okazus, solviĝus multaj lingvaj malfacilaĵoj kaj miskomprenoj, kiuj malgajigas la ĉiutagan homan kontakton.

La respondo estas malfacila, kaj efektive neniu povas klarigi ĝin akcepteble.

Oni diras, kial krei artefaritan lingvon por helpi la internacian komunikadon, kiam ĉi tiun rolon jam plenumas la angla lingvo? Ĝi estas vaste uzata sur ĉiu tereno.

Ĉu efektive la angla lingvo solvis ĉi tiun gravan problemon de la homaro?

Estus bone kredi, ke jes. Sed la fakto tio, ke en la mondo plu daŭras la lingvaj miskomprenoj kaj centmiloj eĉ milionoj parolas fremdajn lingvojn. Malgraŭ la intensa propagando, ankaŭ la angla lingvo estas nur eblo, kiel la aliaj plifaciligi la komunikadon inter diverslingvaj homoj.

Kompreneble tiu ĉi ne trankviligas esperantistojn. De tago al tago ni spertas, la disvastiĝo de Esperanto stagnas, en multaj landoj ĝin parolas nur maljunuloj. La junan generacion apenaŭ interesas la Internacia Lingvo.

Mi tre ŝatus, se oni rekonus la grandegan eblon en Esperanto kaj oni amase eklernus ĝin.

Fakte en Hungario multaj homoj lernas ĝin ĉiujare pro premedevigo. Nur tiu studento de altlernejo aŭ universitato ricevas diplomon, kiu havas atestilon pri ŝtata lingvoekzameno el iu lingvo. Tial oni prefere elektas Esperanton, ĉar ĝi estas ellernebla pli facile kaj rapide ol aliaj naciaj lingvoj.

Kie estas tie ĉi homamaso? En 2010 Esperanto estis la tria plej ofte elektita lingvo post la angla kaj germana. Ĉu la akirita lingvosocio forvaporiĝis? Kial ni ne revidas tiujn ĉi personojn en Esperanto Movado.

Nur kelkaj el ili restos por la zamenhofa lingvo, la aliaj ripozas sur sia sidvango.

Ilia dormo estas granda perdo por Esperanto. Tiuj ĉi homoj forĵetas sian atestilon pri sukcesa lingvoekzameno. Ili neniam provis la ellernitan lingvon en la ĉiutaga vivo.

Eble, se ili havus pozitivajn spertojn, tiam ŝanĝiĝus ilia opinio kaj en la estonto ili uzus Esperanton dum siaj eksterlandaj vojaĝoj, laboroj kaj sur alia tereno de la vivo.

-Ŝaŝa-

Kial lerni Esperanton?

-Diru al mi amiko, kial mi lernu Esperanton? Diru al mi almenaŭ unu argumenton per kio vi povos pruvi al mi, ke ĝi estas pli utila ol aliaj lingvoj? En la granda parto de la mondo parolas tiun ĉi lingvon. En kiu lando estas parolata Esperanto? Por kio mi povas uzi ĝin eksterlande? Onidire por nenio. Mia konatulo, kiu jam traveturis la tutan mondon, diris, nenie oni akceptis ĝin, kiel oficiala lingvo. Kelkaj cent aŭ mil fanatikuloj kunvenadas ĉiujare en diversaj landoj. Ili diskonigas, kiom bonega estas Esperanto, kaj ili faras manifeston por ke la ŝtatoj akceptu la lingvon de doktoro Zamenhof. Post tiuj ĉi kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj ili hejmeniras kaj okazas nenio ĝis la sekva jaro, kiam ĉio komenciĝos denove. Sed rigardu la anglan lingvon! Eksterlande se vi malfermas vian buŝon tuj vi povas kompreni vin per tiu ĉi lingvo. Ne amiko, super Esperanto forflugis la tempo. Vere ĝi estis bela kaj bonega ideo, sed en la praktiko ĝi ne estas uzebla. Ne torturu min, ke mi lernu tiun ĉi lingvon! Mi ne volas lerni ĝin. Esperanto estas nur ludilo. Jes bone estu esperantisto, sed min lasu trankvile! Ho, vi diras, ke ĝi estas facile kaj rapide ellernebla. Eble vi pravas: la tempo estas mono. Mi petegas, per Esperanto vi ne povas orientiĝi en la mondo. Surstrate neniu komprenas vin. Aŭskultu min, se vi scias la anglan lingvon, oni komprenas vin. Ĉu ne? Certe nun jam ankaŭ vi vidas, ke mi pravas. Mi ne lernos Esperanton. Ĝi ne interesas min. For de mi tiun ĉi neuzeblan lingvon! Homoj, lernu la anglan lingvon! Ĝi estas la komuna lingvo de la homaro. Morgaŭ ĝin ĉiu parolos kaj malaperos la naciaj lingvoj. Mi proponas al vi, lernu ankaŭ vi la lingvon de Ŝekspiro. Moderna homo jam ne povas vivi sen ĝi.....

-Ĉu vi parolas ĝin?

-Ĉu la anglan?

-Jes.

-Ne. Ne. Ankoraŭ mi ne parolas ĝin, sed mi nepre volas ellerni tiun ĉi grandiozan lingvon.

-Jozefo Varga-



Viro, kiu ne havis tempon

Li estis kvardekjara iom kalviĝanta, bonhumora viro. Li neniam eniĝis, ĉar la laboro plenumis lian tutan vivon. Li ofte malfruvespere alvenis hejmen kun multaj laboraĵoj. La aktaĵo ĉiam estis plenplena kun diversaj dokumentoj. Ankaŭ hejme li ĉiam laboris. Apenaŭ li hejmeniĝis, manĝis ion kaj li tuj kuregis al la skribotablo por labori.

Li havis nek edzinon, nek amikinojn. La laboro forrabis lian libertempon. Li ne trovis eĉ unu horetan por amuziĝi.

Kiam li estis pli juna, ankoraŭ liaj amikoj proponis al li komune „diboĉadi” en iu bonetosa diskoteko, kie facilanimaj knabinoj emas pasigi brillan nokton kun iu ajn.

Sed li neniam iris kun siaj amikoj. Li nur ridis kaj diris:

-Bonan amuzon, knaboj!



Kelkfoje tio ĉi ripetigis kaj fine la amikoj jam ne volis, ke li „diboĉadu” kun ili.

Li restis sola, sed li tiel fartis bone. Nur la laboro kaj laboro. Tio vivigis lin. Li sidis super la blankaj dokumentoj. Li legis, kalkulis kaj revadis. Liaj ĉefoj estis tre kontentaj pro lia laborkapablo. Baldaŭ li estis altrangigita kaj li ricevis pli multe da salajro.

Oni pensus, ke nun jam li ekripozus. Ja, li atingis altan rangon. Sed ne. Li laboris eĉ pli intense ne indulgante sian korpon.

Kion li deziris atingi? Efektive ankaŭ li mem ne sciis tion. Eble li volis pruvi nur por si mem.

Li laboris de mateno ĝis malfrua nokto. Tiel li fartis bone. Lia vivoĉelo estis la laboro, aranĝi, prizorgi la aferojn de fremdaj homoj.

Ankaŭ en la oficejo li ne havis geamikojn. La kolegoj por li estis nur simpluloj, kiuj ne tro interesis lin.

Li ankoraŭ ne estis maljuna, tamen malgraŭ tio li ŝajnis oldulo. Subite li maldikiĝis. Sed ankaŭ tio ne ĝenis lin. Neniam li enrigardis spegulon. Vere kelkaj kolegoj interflustris malantaŭ li:

-Petro estas grave malsana. Li devus iri al kuracisto.

Vane ili proponis tion al li. Li ne aŭskultis ilin. Li laboris plu kaj plu senripoze.

En iu tago kiam la purigistino eniris la kontoron, lin ŝi trovis kapon kuŝigante sur la skribotablon, kvazaŭ li estintus dormanta. Sed li ne dormis. Li mortis. Li fordormis por ĉiam sciante nenion pri la mondo.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Ivan Naumov

Babelo

Donu al mi fabelon,
 Ĉar io almenaŭ restu,
 Ĉar io almenaŭ nestu
 En pingloza arbusto
 de mia obskura anim'...
 Kiam oni eniros Babelon
 Ĉies vinoj restos sen gusto
 Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencon
 Por io ankoraŭ tremu,
 Por iun ankoraŭ emu
 Longaj ŝtonaj strataroj
 de mia vintroza intern'.
 Kiam oni deklaras komencon
 Ĉies varmo restos sen tegoj
 En frosta kavern'.

Donu al mi nenion
 Laŭ jam forgesita moro.
 Laŭ jam forgesita foro
 Eble glitos ombraro
 de mia neĝoja esper'.
 Kiam oni ektrovos la Dion
 Ĉies dioj restos sen faro
 Kaj mortos sur Ter'.



Poezio

Ivan Naumov

"El condor pasa"

Svenigas vian spiron glito de l'
 Forta bird' tra malhel'
 Pasanta lante.
 Kaj tranĉas helan puron de ĉiel'
 Preter lun', preter stel',
 Kondor'flugante.

Nek sago nek rigardo tuŝos lian vojon
 Laŭ mola vent', tenera vent'.
 Kaj vi surtere ĝuos pluan fojon
 Sonoron de la mondsilent'...
 De l' mondsilento.

Tra polvoj de la viv' paŝanta hom',
 Scias vi ĉion krom
 Flugila tremo.
 Realo estas kvazaŭ daŭra plonĝ'...
 Gvidas vin nur en sonĝ'
 Alteca emo.

Kaj tiam vi samkiel ido de kondoro
 Laŭ mola vent', tenera vent',
 Konvinke surflugilas al la suna oro
 Tra tinta son' de l' mondsilent'...
 De l' mondsilento.
 06.03.1993



Por infanoj

La ŝuetoj de la reĝidino



Iam estis, iam ne, trans la Fabeloceano estis reĝo, kiu havis belegan filineton. Ŝi estis tiom belega, ke la famo de ŝia beleco estis konata ankaŭ en foraj landoj. Lia patro estis tre fiera pri sia filino.

En iu tago la reĝo decidis, ke edzinigos ŝin. En la tuta lando estis alvokitaj princoj, grafoj, baronoj kaj grandsinoroj, ke ili aliĝu fariĝi kandidatoj, kiel la estonta edzo de la reĝidino. Estis unusola kondiĉo: tiu povos fariĝi ŝia edzo, kiu donacos tiajn ŝuojn al ŝi, kiuj instruos danci la filinon de la reĝo, ĉar ŝi ne scipovis danci. Kvankam la profesoroj de la dancoj multfoje deziris instrui tion al ŝi, vane ili klopodis, la reĝidino ne povis ellerni, eĉ la plej facilajn paŝojn. Pro tio ĉiu hontis en la fortikaĵo.

Venis kandidatoj portante ŝuojn orajn, arĝentajn, ornamitajn per diamantoj. Bedaŭrinde neniuj ŝuoj povis instrui la reĝidinon danci. Ili ĉiuj asertis, ke la portitaj ŝuoj faros miraklon.

Post kelkaj movoj la reĝo kun la korteganoj, la reĝidino ne povas danci.

Tio ege malgajigis ĉiun. Intertempe elĉerpiĝis la kandidatoj kaj ili restis solaj. La reĝo sidis sur la trono melankolie kaj li ĉagrenis pro la fiasko. Kiel akiri tian junulon, kiu povos porti miraklajn ŝuojn por la reĝidino? Nepre li devos eltrovi ion. Reĝidinon ĉiu priridos, se baldaŭ ŝi ne ellernos danci. Kia estos la geedza ceremonio, se ŝi nur sidos ĉe la tablo kaj la aliaj gastoj amuzigos sin dancante. Fine la novbakita edzo forlasos ŝin kaj li serĉos por si knabinon, kiu scipovas danci.

Kiel li malgajis en la tronejo, neatendite envenis junulo, kiu estis servisto en la fortikaĵo. La reĝo kolereme alkriis lin:

-Kion vi volas? Diru rapide, ĉar mi ne havas bonhumoron.

La servisto venis pro tio, ĉar la ĉefkuiristo demandis, kiam deziras tagmanĝi la reĝo.

-Hodiaŭ mi ne deziras tagmanĝi. For de mi! Mi senkapigos vin, se vi ne foriros tuj.

La junulo ne ektimis, eĉ plu li demandis la reĝon.

-Mia reĝa Mosto, pardonu min pro mia kuraĝo, bonvolu diri al mi, kial vi havas malbonhumoron! Eble mi povos helpi al vi.

-Kiel vi povus helpi? Ja vi estas nur simpla servisto ĉe mi, sed se vi deziras, malkaŝas al vi la sekreton. Mia belega filineto ne povas danci, kaj ne ekzistas tiaj ŝuoj, kiuj povus instrui al ŝi tiun ĉi sciencon.

-Ĉu nur tio estas la problemo? – ekridis la junulo. – Ĝis la sunsubiro mi instruos tion al ŝi.

-Ja, vi ne havas dancoŝuojn, kiel vi povus instrui tion al mia kara filineto?

-Mia reĝa Mosto pro tio ne ĉagrenu! Voku ĉi tien vian filinon, por ke ni povu komenci la dancolecionon.

La reĝo amare obeis al la servisto kaj vokis la reĝidinon.

La junulo diris al ŝi:

-Senŝuiĝu, kaj estu kiel mi, nudpiede.

Ŝi vole nevole liberigis de siaj oraj ŝuetoj kaj en la tronejo komenciĝis la leciono. La reĝo ordonis al la muzikistoj muziki por la dancantoj.

Komence la reĝidino iom mallerte sekvis la junulon, sed subite la belega melodio sorĉis ŝin. Nudpiede ŝi sentis sin libera, kaj ili flugis sur la planko, kiel la birdo.

Kiam la Suno ĝuste volis malaperi malantaŭ la montoj, la reĝidino ellernis la dancadon. Ŝia patro tre miris kaj dankegis al sia servisto, kiu instruis danci la reĝidinon.

-Filo mia, petu ion ajn! Mi plenumos vian deziron.

Dum la dancado la gejunuloj enamiĝis unu al la alia kaj li diris al la reĝo:

-Mia reĝa Moŝto, mi ne diras oron, arĝenton, donu al mi la manon de via filino, ĉar mi tre amas ŝin.

La reĝo ne kontraŭis la peton. Li feliĉe konsentis, ke post tri tagoj okazu geedza ceremonio.

Eble tiel okazis, eble ne. Kiu ne kredas, tiu iru tien kaj konvinkiĝu propraokule.

-Onklo Adalberto-



Gajaj bildoj



Gajaj bildoj

